

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 4

Septembro / Oktobro 1981



Hungario preparas la 34an IFEF-Kongreson

La esperantistaj fervojistoj travivintaj brilajn tagojn en Regensburg pasintan Majon apenaŭ povas atendi la sekvan kongreson de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), kiu disvolviĝos de la 1a ĝis la 8a de Majo 1982. Niaj hungaraj gekolegoj elektis eksterordinaran kongreslokon: Balatonfüred situanta belege apud la fama Balatonlago. Tie, en granda hotelo, la kongresanoj almenaŭ la plimulto, loĝos, partoprenos la diversajn kongresaranĝojn kaj ĝuos samtempe la preferon libertempoj en unu el la plej allogaj turismaj lokoj de Hungario.

Ne mirinde, ke la intereseo de la germanaj partoprenantoj kredeble estos same granda kiel dum antaŭaj kongresoj des pli,

ĉar LKK ofertos per kelkaj ekskursoj la eblecon konatiĝi kun la ĉirkaŭaj lokoj. La Balaton-lago ampleksas ĉ. 600 km², havas longecon de 77 km kaj larĝecon inter 2 kaj 14 km. Dum la printempo kaj somero ĝi varmiĝas rapide. Sur la norda bordo leviĝas montetoj, kie oni kulturas bonegan vinon. BULTENO publikios pluajn informojn, ankaŭ pri la planitaj ekskursoj kaj la postkongreso en Budapeŝto.

Pro la fakto, ke la partopreno al la 34a IFEF-Kongreso necesigas kelkajn pripensojn kaj preparojn, estas rekomendinde zorgeme legi la sekvajn informojn en germana lingvo kaj aliĝi eble plej baldaŭ. W. B.

34. Internationaler Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten in Balatonfüred (Ungarn) vom 1. bis 8. Mai 1982

Anmeldung

Anmeldevordrucke werden wie üblich durch die Bezirksbeauftragten ausgegeben. Der ausgefüllte Vordruck ist unmittelbar dem ungarischen Kongreßkomitee zu übersenden. Dagegen wird der Kongreßbeitrag auf das Bankkonto des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) nach Dänemark überwiesen. Die Mitnahme der Überweisungsquittung zum Kongreß wird empfohlen. Die Höhe des Kongreßbeitrages ist im Anmeldeformular in niederländischen Gulden (Fl) angegeben. Ab 1. Februar 1982 (Eingang der Überweisung) gilt ein höherer Kongreßbeitrag.

Visum

Teilnehmer aus dem Bundesgebiet benötigen für die Einreise nach Ungarn einen gültigen Reisepaß und ein Visum, das jeder für sich mit 2 Lichtbildern über ein Reisebüro besorgen muß. Die Kosten für das Einreisevisum betragen je Person 16,— DM. Außerdem ist eine Bearbeitungsgebühr von 14,— DM zu zahlen. Im Grenzbahnhof gibt es keine Visumerteilung.

Reiseweg

Der reiseübliche Weg mit der Eisenbahn führt über Wien — Budapest. Wegen evtl. Übernachtung in Budapest wenden Sie sich besonders an das Kongreßkomitee. Auf den Aufenthalt (mit Übernachtung) in Budapest kann verzichtet werden, wenn ein Nachtzug nach Wien benutzt oder eine Übernachtung in Wien eingelegt wird. In diesem Fall empfiehlt sich folgende

Verbindung (Stand: Sommerfahrplan 1981) im Mai 1982 geltende Fahrplan bekannt-
 Im BULTENO wird rechtzeitig der gegeben.

| | | | | |
|---------------------|-------|-----------------------|----------------|-------------------|
| Köln Hbf | 18.25 | } Holland-Wien-Expreß | | |
| Frankfurt (M) Hbf | 21.00 | | | |
| Wien West | 6.40 | | | |
| Wien Süd | 7.35 | | oder Wien West | 8.05 nur samstags |
| Budapest Keleti pu. | 11.35 | Székesfehérvár | 11.58 | |
| Budapest Déli pu. | 12.40 | Székesfehérvár | 13.48 | |
| Balatonfüred | 14.52 | Balatonfüred | 14.52 | |

Unterbringung

Die Kongreßteilnehmer werden in Zwei- und Dreibettzimmern untergebracht. Für Einbettzimmer wird ein erheblicher Aufschlag verlangt. Vollpension ist obligatorisch. Weitere Einzelheiten siehe Anmeldeformular.

Zahlungsmittel

Die Mitnahme von DM ist in beliebiger Höhe erlaubt. Sie müssen bei der ungarischen Zollbehörde angegeben werden.


Ungarische Währung darf nur in Münzen im Höchstwert von 100 Forint (etwa 7,30 DM) ein- und ausgeführt werden.

Informationsmaterial

Das IBUSZ Ungarische Reisebüro, Baseler Straße 46, 6000 Frankfurt (M) 1, (Tel.: 06 11 - 252018) übersendet auf Anfrage kostenlos touristische Prospekte über Ungarn. Es vermittelt auch Einreisevisa.

W. B.

Kongreso de la junularo



66a Universala Esperanto-Kongreso

la parlamentejo en Brasilia. Tie okazis la inaŭguro.

En la brazila ĉefurbo Brasilia okazis la de la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto
 66-a Universala Kongreso de Esperanto 1981. La unua impresio: Tiu estis

kongreso de la junularo, ĉar proksimume la duono de la ĉirkaŭ 1750 kongresanoj estis junaj homoj.

Kian grandan subtenon kaj atenton trovis la kongreso flanke de la ŝtato, montris la faktoj, ke la inaŭguro okazis en la parlamentejo de Brazilia, ke la prezidanto de la Federacia Respubliko Brazilo, João Baptiste der Oliveira Figueiredo, estis la Alta Protektanto de la kongreso, ke centoj da junaj kongresanoj preskaŭ senpage povis loĝi en Brazilia kaj partopreni aliajn avantaĝojn.

Ankaŭ la brazila Esperantomovado faris laŭdindajn preparojn. Dum la brazila vespero, la teatra vespero kaj la balo ĉiuj popoldancaj kaj folkloraj prezentadoj estis faritaj de grandaj grupoj de junaj esperantistoj, prefere el la sudaj regionoj de Brazilo.

Nekrologo

La 15an de Julio 1981 — ok tagojn post la okdeka datreveno de sia naskiĝtago — mortis sekve de kormalsano nia estimata kolego

Peter Hermanns

en 4512 Wallenhorst 2 / Lechtingen, Kreuzweg 7.

Jam en junaj jaroj li esperantiĝis, kaj dum jardekoj post la dua mondmilito li estis membro de nia Fervoĵista Asocio.

Kiel vigla esperantista kolego en la distrikto Essen kaj regula partopreninto de la naciaj kaj internaciaj GEFA-kaj IFEF-Kongresoj kune kun sia edzino — aktiva Esperantistino — li estis bone konata al multaj fervoĵistaj esperantistoj.

Dum multaj jaroj Peter Hermanns loĝis en Duisburg, kie li deĵoris en la stacio Duisburg-Wedaŭ; kiel emeritulo li transloĝis al Hagen-Vorhalle kaj poste al Wallenhorst. Li fervore gvidis la lokan fervoĵistan Esperanto-grupon en Duisburg kaj poste en Hagen.

Sincere ni esprimas nian kondolencon al la vitvino, sinjorino Friedel Hermanns, kaj al la familio.

GEFA-estraro

Inter la 150 programeroj ĉiu povis elekti la konvenajn. Kiel fervoĵisto mi kompreneble estis en la IFEF-kontaktkunveno, kiun partoprenis 12 gekolegoj el 8 landoj. Krome mi vizitis la kunvenojn de IPTEA kaj de la Eŭropa Klubo, diversajn preleĝojn kaj la akcepton por la membroj de la Societo Zamenhof. Kun 30 aliaj germanaj kongresanoj mi ankaŭ estis ĉe la akcepto en la germana ambasadejo.

Multaj aliaj kongresaranĝoj estus menciindaj kiel la ĝeneralaj kunsidoj, la granda simfonikoncerto kaj la eldono de la speciala Esperanto-poŝtmarko, sed la plej grava ja estis la renkontiĝoj kun geamikoj el la tuta mondo, kun kiuj mi dum la kongreso multe parolis.

Heinz Schindler

El la grupoj

Bremen

Informoj kaj diskuto

La 19an de Aŭgusto la klubanoj ricevis informojn pri la stato de la preparoj por la 75a jubileo de la loka grupo kaj de la NOGELO-jarkunveno.

La dua punkto de la tagordo estis diskuto pri: Kiel realigi ideojn? La rondo diskutis pri tiu nekutima temo kun la subtemoj: Realigi ideojn, lerni realigi per realigado, tiel vi evitas esti rigardata strangulo, esploru laŭsisteme novajn ideojn spertiĝo per diskutado, starigi kontaktojn. Nia amiko Dieter Hartig prezentis diskutfoliojn kaj gvidis la diskutadon en konata perfekta maniero.

Maja ekskurso la 9an de Majo

Renkontiĝis kaj kunmarŝis 17 gesamidanoj, kiel gastojn ni bonvenigis ges-rojn Bormann.

Ni iris laŭlonge de la Lesum-rivero sur la digo. La vetero estis tre bela. La suno brilis kaj la humoro estis bona.

En kaŝa loko apud la rivero estis la „Schloßbesichtigung“. Temis pri malnova pend-seruro — Vorhängeschloß —; estis gaja surprizo. Ni kantis la popolkanton pri Regensburg kaj daŭrigis la vojon al proksima kafejo. Jen ni paŭzis, gustumis la kafon kun kuko kaj konversaciis. Ni transiris la Lesum ĉe la river-barejo kaj hejmenmarŝis sur la Admiral-Brommy-Weg.

Estis tre agrabla ekskurso dank al la interesa vojo kaj la belega vetero.

Korespondando deziras:

Josef Slezák
P.O.-Box 218
36021 Karlovy Vary 1
Ĉeĝoslovensko

Essen

Die Werbemethode unseres Mitglieds Manfred Retzlaff führte zu weiterem Erfolg. Die neuen Freunde Volkmar Engelbrecht, Nm Dortmund, Michael Gast, Gepa Gelsenkirchen Hbf und Günter Priwall, Sm Oberhausen sind ab 1. 8. 1981 Mitglieder unserer Vereinigung. Wir entbieten ein herzliches Willkommen.

München:

Heredaĵo de antikva Esperanto-literaturo
Hodiaŭ mi volas pritrakti temon, kiu certe estas tiom grava, ke ni ne povas daŭre neglekti ĝin.

Ĉiam denove ni devas sperti, ke post forpaso de Esperantoamiko la Esperanto-postlasaĵoj malaperas, ĉu formetitaj en kelo ĉu forĵetitaj de heredantoj, kiuj ne scias kion fari kun tiuj aĵoj. Ĉu ni povas toleri, ke perdiĝas ofte ne plu rehaveblaj valoraĵojn, literaturaj kaj aliaj?

Mi volas proponi, ke ĉiu skribe decidu, kio okazu kun Esperanto-postlasaĵoj kaj por esti certa, ke la afero iru en la ĝustajn manojn estus konsilinde, skribe informi (kopio) la heredantojn, ĉu lokan klubon, asocion, bibliotekon, Esperanto-instituton aŭ aliajn. Tio estas des pli necesa, se la heredaĵo eble estas mono por la movado.

Ni devas konsideri, ke ne ĉiuj heredantoj estas amikoj de Esperanto, sed, se ekzistas skribaj decidoj kaj informoj ĉe la ricevanto la volo de la donanto certe estos respektata.

Mi esperas, ke multaj sekvas al miaj instigoj kaj espereble ni povas savi tiel niajn ofte jam antekvajn literaturaĵojn.

Josef Weidacher

Münster kaj Osnabrück

Ankaŭ en ĉi-tiu jaro okazis nia tradicia Majo-ekskurso, ĉi-foje en la bela ĉirkaŭaĵo de Osnabrück. Bedaŭrinde, kiam ni renkontiĝis antaŭ la stacidomo de Osnabrück je la 10a horo, ni estis nur 7 personoj. Ĉu la kaŭzo estis la malvarma vetero je la unua de Majo aŭ ĉu la

GEA-kongreso en Westerland/Sylt allogis tro multajn Esperantistojn? Tamen ni ne lasis senkuraĝigi nin. Sub la gvidado de sinjoro Witte ni veturis unue al la „Haster“ muelejo. De tie ni atingis baldaŭ la aleon al la „Honeburga“ kastelo. Poste ni grimpis al la altebenaĵo „Piesberg“ kiu pro multaj rompigitaj bazaltaj ŝtonoj pli kaj pli malgrandiĝas. Nia plua vojo kondukis nin preter malnova ŝtonkruco el la karolinga tempo kaj dolmeno el la antaŭkristana tempo preskaŭ ĉiam tra bela abato kun freŝa printempa verdaĵo. Post forlaso de la arbaro ni havis antaŭ ni la „Nette“-valon. Ni ĝojis jam, ke ni baldaŭ povus trankvile sideti kaj iomete manĝi en la gastejo Knollmeyer. Sed bedaŭrinde estis la restado tie malagrabla pro tro granda bruado de junaj homoj. Krome ni vizitis en la „Nette“-valo la restaĵojn de malnova kastelo el la tempo de la sakso duko Wittekind. Dum la migrado reen al Osnabrück ni longe sekvis la rivereton Nette. Por urba aŭtobuso ni veturis al la centro de la urbo, kie ni estis ankoraŭ gastoj de la familio Holtmann.

Malgraŭ kelkfoja pluvo kaj eĉ hajlado survoje estis ĝojplena tago.

J. S.

25a GEFA-jarkunveno

Kutime 25a datreveno estas kaŭzo por festa aranĝo. Origine ankaŭ GEFA intencis doni al tiu ĉi evento pli festan karakteron por ĉiuj membroj, sed la cirkonstancoj ĉi-jare estas aliaj. La 33a IFEF-kongreso en Regensburg elĉerpis fortojn de la organizantoj kaj ankaŭ monrimedojn. Pro tio la GEFA-estraro decidis, organizi kunvenon (kiel post la kongreso de Fulda ankaŭ okazis) por la distriktkomisiitoj kaj por ĉiuj LKK-anoj kun edzinoj. Ili kunvenos inter la 9a kaj 11a de Oktobro en la Kolping-domo en Offenbach. Krom la laborkunsido restos iom da tempo por modesta programo kaj ekskurso al la romantika akvokastelo Mespelbrunn.

La koncernaj gepartoprenontoj ricevos ĝustatempe apartan invilon.

E. Kruse

Redaktfino por n-ro 5/81 estas la 10. 11. 1981.